

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

N-ro 18 \* 5. Febr. 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa  
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

\* Eliras semajne. \*

### La Stato de nia Movado en nuntempa Ruslando.

En kia stato estas nia movado en nuna Sovjet-registara Rusujo? — Tiu ĉi demando eble interesas multajn niajn samideanojn. Tial mi, reveninte mem. antaŭ nelonge el Rusujo, decidis priskribi laŭpove, en malgranda skizo, ĉi tie la staton de la Esp. movado en Rusujo entute, sed precipe en Moskvo — centro de politika kaj sociala vivo de la Sovjeta Respubliko — post la revolucio 1917.

Post la unua „februara“ revolucio 1917, la Esp. movado en Rusujo forte plivigliĝis. Aliĝadis al ĝi iom post iom ne nur la inteligentularo, sed ankaŭ la laboristoj kaj militistoj. Pli kaj pli kreskis la nombro de samideanoj; unu post alia aperis novaj Esp. ĵurnaloj, gazetoj (plejparte, certe, manuskribitaj) ne nur en la centroj — Moskvo kaj Petrogrado — sed eĉ en la pli malgrandaj urboj de provinco.

Ofte okazis publikaj kunvenoj, festoj, koncertoj, pli kaj pli kreskis nia espero...

Kaj ekbruliĝis la „oktobra“ revolucio, kun ĝiaj belaj, pacemaj ideoj...

„Jen, eble venis, fine, en Rusujo la tempo de Esperanta triumfo! Jen, kiam ni esperantistoj devas laboregi por nia ideo!“ Tiel pensis ni esperantistoj, aŭskultante ĉie la belajn, humanajn, internaciemajn ideojn de Nova Revolucia Registaro. Sed forpasis la unuaj tagoj, malaperis iom post iom la pacaj, belaj ideoj, kaj ilin anstataŭis la tempo de kruela teruro, sekvata de malsato, malvarmo...

Ciu, kiu havis eĉ la plej malgrandan eblecon, forveturis panike el la du centroj de krueleco, de malsato, malvarmo — parte tute eksterlanden, parte suden, norden — kien ajn — nur for!

Haltis tuj la progresado de nia movado, kaj komencis ĝi pli kaj pli senvivigi.

El multnombraj spertaj eminentuloj-esperantistoj restis nur kelkaj, aliaj ĉiuj forveturis aŭ transloĝiĝis ien.

Sed, malgraŭ tio, malgraŭ eĉ la teruraj vivkondiĉoj, la poresperantan laboron ne ĉesigis tiuj kelkaj samideanoj. Kun forta energio ili daŭrigis siajn klopodojn pri enkonduko de nia lingvo en la lernejoj, kaj efektive en aŭtuno 1918 ili sukcesis en tio.

Ce la komitataro de publik-instruado estis aranĝata en Moskvo komitato, kies celo estis, okupi sin per la mondlingva problemoj.

Post mallonga pridiskuto, ĉe kiu certe ĉeestis kelkaj el niaj spertaj samideanoj, la komitato, akceptinte rezolucion, proklamis:

1. La sola vivanta internacia lingvo, kiu povas efektive servi al la popoloj kiel mondlingvo, estas Esperanto.
  2. De nun en ĉiuj lernejoj Esperanto estas enkondukota kiel fakultativa en la tuta Sovjeta Respubliko.
- Sed niaj samideanoj ne trankviliĝis je tio ĉi, ili laboris plu; kaj baldaŭ sekvis ankoraŭ du venkoj, nome: La Sovjeta registaro transdonis al la Moskva Societo je plenrajta uzado la luksan domon, pli vere palacon, apartenintan antaŭe al Lopatin, kaj unu tipografion.

„Ĉu estas songo? Ĉu ni rusaj esperantistoj povus eĉ malnova reĝimo eĉ revii pri ĉio ĉi?“

Sed tio ĉi nur ŝajnis tiel brila: la efektiveco estis alia.

Jes! ni havis palacon, eĉ propran tipografion: nia lingvo estis oficiale enkondukita en ĉiuj lernejoj! Sed... ni ne povis ĉion ĉi utiligi, bonuzi.

La kaŭzo? plena foresto de samideanoj en Moskvo, estonta centro de nia movado en Rusujo, plena foresto de spertaj, energiaj gvidantoj.

Plena foresto de ili estis la kaŭzo de tio, ke la proklamo de l' komitato pri la enkonduko de Esperanto en lernejoj restis nur sur la papero, ne povante efektiviĝi pro malbonstato de nia movado.

Kiel brila ekzemplo, pripentranta ĉion ĉi, povas servi mia vizito al la „Domo de Esperanto“.

Alvenante al tiu luksa palaco, mi jam de malproksime rimarkis la grandan Esperantan standardon pendigitan super la pordo. Kun granda emocio mi haltas kaj sonas ĉe la pordo. Neniu venas. Mi sonas, sonas, eĉ sonegas. Neniu venas. Tiam mi eniras korton, kaj tra malgranda pordo penetras en la domon.

Luksaj ĉambroj, luksa meblaro, sed vere **hunda malvarmo**, kaj nenio signo pri la aparteno

de la domo al esperantistoj, des pli pri „Domo-Esperanto“! Mi iras pluen. Nenie estas eĉ la plej malgranda aludo pri la ekzistado de vivantaj estaĵoj ĉi tie.

Fine, tute hazarde, sur unu el malgrandaj pordoj en iu koridoro, mi ekvidis vizitkarton.

Tute senespere mi puŝis la pordeton — ŝlosita! Subite, je mia granda ĝojo, mi ekaŭdis paŝojn post ĝi. Fine — vivanta estaĵo!

„Bonan tagon, samideano!“ diris mi.

„Ĉu eble? Esperantisto?“

„Jes, jes, certe!“

„Nu, venu ni en salondon (kvankam tie estas diabla malvarmo!) kaj parolu tie!“

Jen nia interparolo en luksa salono kun luksa meblaro de la „Domo de Esperanto“:

Mi: „Ĉu ekzistas Moskva Societo?“

Li: „Ne, sed ni fondis nun la Tut-Ruslandan Esperantan Unuiĝon.“

„Ĉu mi povas aniĝi al ĝi?“

„Jes! Sed... mi ne havas nuntempa paperon por enskribi vian familinomon. Nu, mi ne forgesos ĝin.“

„Ĉu vi havas Esperantajn librojn, broŝurojn?“

„Ne, bedaŭrinde, ni nenion havas. Pli ĝuste dirite, ni havas tro multe: ni havas eĉ propran tipografion, sed... neniam da papero. Eĉ por presi broŝurojn, oni al ni ne donas paperton.“

„Ĉu estas aranĝitaj kursoj?“

„Ne: tute forestas samideanoj, kiuj povus sin okupi per tio! Mi estas la sola, kiu laboregas kiel maŝino. Tien ĉi, tien — ĉien mi devas kuri, ĉie labori sola — neniu al mi helpas.“

„Verŝajne la lernolibroj ankaŭ forestas?“

„Entute! Kaj mi eĉ ne havas la esperon, iam ricevi iom da ili.“

... Kvazaŭ kun peza ŝtono sur la koro, mi eliras el la „Domo-Esperanto“. Al mi ŝajnas, ke mi juŝ ĉeestis enterigon de iu...

„Lernejoj... palaco... tipografio...?“

Jen estas la efektiva „brilo“ de niaj venkoj! Pli kaj pli malvigliĝas nia movado en Sovjeta Rusujo, ekzistas nek ĵurnaloj, nek lernolibroj, eĉ ne parolu pri literaturo!

Certe, ekzistas ankoraŭ societoj, sed kion oni povas atingi, havante neniujn mon-kaj propagandrimedojn?

Sed kio estas kulpa je tio? Ĉu la ebla indiferecento de l' rusaj esperantistoj? Ĉu — ilia maldiligenteco, malfervoro?

Ne! Milfoje: ne!

La vivkondiĉoj en nuntempa Rusujo — jen estas la kaŭzo de tiu malprogreso! Vere: ĉu povas sin interesi per iu ajn ideo la amaso, kies ĉiuj zorgoj kuniĝas nur en unu mania penso: kie ajn nur kapi nutraĵojn kaj hejtajn por ne pere! pro malsato kaj malvarmo?

Sed, malgraŭ tio ĉi, niaj rusaj samideanoj ne dormas — tion provas la pli super priskribitaj venkoj, kaj, kvankam en Rusujo restis nur kelkaj de ili, niaj ĉiuj eminentuloj ne permesos al tiuj samaj malamikoj „malsato kaj malvarmo“ mortigi nian ideon. Ĝi vivos, eĉ en la nuntempa Rusujo. Ĝi vivos!

L. Leonalt.

\*) En Sovjeta Rusujo la tuta papero, kiel ĉio, estas nacifika (konfiskita) de la registaro.

### Pri nia Gazetaro.

Jam de multaj jaroj oni multfoje diris, skribis, predikis, ke ni, esperantistoj, havas superfluon da gazetoj, ke ili apenaŭ vivetas pro manko da abonantoj kaj tielkaŭze ne povas progresi, fariĝi pli enhavoriĉaj, pli ampleksaj kaj interesaj. Mi ankaŭ skribis iam pri tio sama („Esperanto“ de LIEA, 1908, n-ro 27).

La mondilito mortigis multajn, tre multajn niajn ĵurnalojn, inter ili eĉ la tiel gravajn kaj meritplenajn, kiel „Lingvo Internacia“, „La Revuo“ k. a. Sed apenaŭ ekstarigis la duonpaco, sub kies reĝimo ni nuntempe vivas, tuj aperis, kvazaŭ fungoj post-pluvo, multego da novaj gazetoj, — eble eĉ en pli granda nombro ol antaŭ la milito... Kaj, kiel antaŭe, preskaŭ ĉiuj havas la saman programon, ĉiuj ripetata la ŝamajn faktojn kaj la ŝamajn — frazojn!...

Do, leginte unu gazeton, oni tute povas preterpasi, ne leginte plejan parton de artikoloj en ceteraj gazetoj...

Samtempe, se oni havas iun originale verkitan aŭ tradukitan artikolon ne tre mallongan, oni ne sukcesas trovi por ĝi liberan lokon (spacon?)

en iu ajn gazeto, — ĉar plejmulto de Esp. gazetoj eliras monate en amplekso de 8-16-20 paĝoj, kaj, kompreneble, ili ne povas presigi en unu numero, ekzemple, 15-paĝan artikolon; kaj dividi ĝin en 4-5-6 partoj por presigi dum 4-5-6 monatoj estus ja tute neoportune, same por la legantoj kiel por la aŭtoro. Tial niaj ĵurnaloj estas ofte plenaj je bagatelaj, kies ununura valoro estas ilia mallongeco. Tial estas tute neeble esperantigi la ĉefverkojn de mondiiteraturo: niaj mizerampleksaj gazetoj ne povas lokigi ilin sur siaj paĝoj, kaj, aliflanke, ilia eldono en libroformo postulas tro grandajn elspezojn, kies enspezojn oni devas atendi dum kelke da jaroj, — tion eldonistoj ne ŝatas.

Finfine mi plene konsentas kun s-ro Paŭlo Balkanyi („Esp. Triumf.“, n-ro 8), kiu sopiras pri interesa, impona kaj grandampleksa Esp. ĵurnalo. Vere ni fian urĝe bezonas, se ni volas progresi, iri antaŭen, sed ne stari sur sama loko kaj ripeti malnovajn frazojn pri „nira kara lingvo“ kaj pri ĝia „baldaŭa venko“... Ĝi ne venkos, ĝis kiam ni ne montros al la mondo, ke esperantistoj estas seriozaj homoj, sed ne tro babilemaj utopiuoj!...

S-ro P. Balkanyi estas tute prava, dirante, ke niaj gazetoj ne kapablas inspiri estimon al la ne-esperantista publiko... kaj samtempe ili ne kapablas (aldonas mi) kontentigi la bezonojn de la esperantista publiko pri interesa, instruiga legajo, konvena ne por infanoj, sed por plenaĝaj, instruitaj, seriozaj homoj. Certe, estas sufiĉe grava fakto, ke, ekzemple, s-ro B. malfermiĝis kurso kun 17 partoprenantoj, — sed, se la duono de enhavo en ĉiuj gazetoj estas plena je fiaspecaj informoj, ĝi fariĝas fine tro monotona kaj enuiga — kaj oni flankenmetas la Esp. gazeton por legi ion pli legindan... Ĉu ne vere?!

Mi legis kun granda kontentiĝo la artikolon pri nia gazetaro en „Esperanta Finnlando“, n-ro 8. Mi ne volas ripeti la maldolĉajn veraĵojn, kiujn eldiras la aŭtoro pri multaj Esp. gazetoj, — la redaktoroj legu mem la tre atentindan artikolon kaj serioze pripensu...

Kio do estas farota? Jen mia opinio:

Mi ne volas fiksi — eĉ proksimume — la nombron da bezonataj gazetoj: eble — dek, eble — dudek. Sed ĉiu gazeto nepre devas havi sian propran fizionomion. Nur originale aŭ precize difinita specialeco de enhavo povas doni ekzistrajton al Esp. gazeto. Nur tiamaniere estas nenligbla la tute senbezona, senbaza kaj senefika konkurado inter niaj pres-organoj; ĉar ĝi sekvigas ne ilian pliboniĝon (kutima sekvo de konkurado), sed nur mankon de abonantoj. Certe la „Oficiala Gazeto“, kiel organo de niaj Lingva Komitato kaj Konstanta Komitato de la Kongresoj, kaj „Esperanto“, kiel organo de LIEA, estas bezonataj kaj devas ekzisti, — ĝis kiam reorganizo aŭ, eble, kunfandiĝo de la nomitaj institucioj ekpostulos ankaŭ reorganizon de koncernaj gazetoj. Sed ili ambaŭ devas limigi sian enhavon je iliaj tute specialaj taskoj.

Due, ni bezonas grandampleksajn, pure literaturajn (beletristikajn, popular-sciencajn k. c.) revuojn, monatajn aŭ dumonatajn, kiuj tute ne okupas sin pri Esperanto-movado, propagando ktp., lasante fluajn ĉi fakojn al specialaj gazetoj. Tiamaniere ili povos aperigi sur siaj paĝoj pli-malpli grandajn verkojn de la mondiiteraturo kaj doni vere interesajn legaĵojn al la tiumonda esperantistaro. Sufiĉa kvanto da abonantoj estas certigita al tiaspecaj revuoj.

Ĉu ni bezonas semajnan gazeton? Jes, certe, sed ĝi devas ankaŭ havi „sian propran fizionomion“. Kian? Proksimume fian, kian havas samspecaj naciaj ĵurnaloj. Ni ĉiuj bone scias, ke Esperanto estas neŭtrala en politika, socia kaj religia rilato. Sed tio tute ne signifas, ke esperantistoj ne interesigas pri politikaj k. s. aktualoj, ke la bolana vivo de la tuta civilizita mondo preterpasis ne tuŝante ilin. Do, jen estas la kampo, kiun povas kulture semajna gazeto.

Kio koncernas speciale-sciencajn, fakajn ĵurnalojn, mi kuraĝas opini, ke ilia tempo ankoraŭ ne alvenis. La sorto de jam ekzistintaj kaj mortintaj tiaspecaj gazetoj („Sciencia Revuo“, kelkaj medicinaj ktp.) sufiĉe pravas la antaŭtempecon de ilia apero. Kiam koncernaj internaciaj asocioj (de instruistoj, natursciencistoj, kuracistoj k. a.) ne nur estos fonditaj, sed pruvos sian daŭran vivokapablon, nur tiam venos la tempo por eldoni





# Internacia Foiro de Breslau

Printempa Foiro

5-a ĝis 8-a Aprilo 1921

Teksajoj, vestaĵoj, ornam- kaj bijuteri-komercaĵoj, or- kaj arĝentaĵoj, armetio, mastrumadartikloj, mebloj, ludiloj, papero kaj paperaĵoj, nutraĵoj, drogoj kaj kemiaj produktaĵoj.

Informojn donas

**Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.**

Esperanto-fako

Breslau I, Ohlauerstr. 87.

# Novaj Parfumoj Idol

por la eksportado al ĉiuj landoj.

Por reklamo oni sendas afrankite laŭ peto:  
1 botelito, super-bonkval. esenc., F. F. 14.—  
1 botelito, super-bonkval. esenc., F. F. 6.—  
1 specimeno, kvintesenc. (ekstra) F. F. 2.50  
Pago per ĉeko aŭ bankbileto (mk., ŝil. ktp.)  
— Granda rabato por gravaj mendoj. —

Petu al:

**H. Bidaux,**

ekskluziva eksportisto,

Paris, 5 Place d'Aligre.

Oni petas reprezentantojn en ĉiuj landoj.

Eksportado

Japana

Importado

## Esperanta Komerca Korporacio

Jokobama, Jamasitaco 80

日本エスぺラント貿易商會

輸出輸入商

横濱市山下町七十番

Korespondado ekskluzive en Esperanto.

Telegrafa Adreso: Esperanto Jokohama.

Telegrafaj Kodoj: ABC Eldono 5-a, Bentley, Lieber, Western Union kaj Privata.

Reprezentanto: R. Kreuz, Frankfurt a. M. (Germ.), Schneckenhofstr. 15.

## MAŜINOJN

por agrikulturo, elektro-teknikajn artiklojn, kolorigilojn, ludajojn ktp. liveras al ĉiuj landoj

**Rudolf Meyer, Frankfurt a. M. - West**

(Germ.), Rödelheimer Landstr. 24.

## HINAJ SILKŜTOFOJ

Mi sendas per poŝtpakaĵoj ĉiuspecajn hinajn silk-ŝtofojn kontraŭ respond-kuponoj. Tre bone por vestaĵoj de eŭropaj infanoj kaj virinoj.

Sendu unu respond-kuponon por belaj specimenoj ktp.

Esperanto korespondata.

C. S. Gee, Hai-Yen (via Shanghai), Ĥinujo.

Ĉiuspecaj poŝtkartoj,

## Leter-Paperoj

kopiaj paperoj kaj inksorbiloj estas malkare aĉeteblaj ĉe

Jozefo Major \* Budapeŝt IX, Remete str. 36-11-4.

Mi vendas prefere grandkvante. Al inform-petoj aldonu respond-elspezon.

## Abonojn al ET

oni bonvolu pagi per resp.-kup. (15 por 10 n-roj) aŭ prefere per ŝtataj bankbiletoj. Ni liveros por 20 gmk. 12 n-rojn de ET. Por 10 ŝil., 10 sv. fk., 10 pesetoj, 10 nordaj kronoj aŭ 5 ĥfl. 50 n-rojn, por 10 fr. fk. aŭ 1 dolaro 25 n-rojn, por 10 italaj liroj 15 n-rojn, por 10 finnaj mk. 10 n-rojn. — Tuj ĉi prezoj valoras por ĉiuj landoj kun valuto pli alta ol la germana. Al Germanio, la Balkano aŭ la Baltikaj landoj ni liveros 10 n-rojn por 10 gmk., al Ĉeĥoslovakio 15 n-rojn por 20 Kč. Specialajn prezojn por Aŭstrio, Hungario, Polio kaj Estonio oni demandu ĉe niaj respektivaj reprezentantoj.

Niaj Abonejoj.

AŬSTRIO.

Esp.-Societo por Stirio, Graz, Schönaugasse 6.

ĈEĤOSLOVAKIO.

Oto Skleněčka, Hradec Kralové.

Prof. J. Süßner, Saaz 687.

ESTONIO.

Helmut Drezen, sekretario de Est. Esp. Unuiĝo

„Espero“, Riitli t. 6, Tallinn.

GERMANIO.

Postcheckkonto Köln 708 65, Teo Jung, Horrem

Bez. Köln.

HUNGARIO.

Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt, Hajos-utca 15, II, 2.

POLIO.

Adolfo Oberroman, Warszawa, Krak. Przedm. 10.

PORTUGALIO.

Agencia Esperantista, Silva & Carreira, Rua da

Assunção 42, 3.

### Anoncoj.

SENPAGE mi sendas Manifeston de Nederlandaj Kontraŭ-Militaristoj al ĉiu, kiu petas ĝin per il. poŝtkarto. G. P. de Bruin, Alleweg 9, Enschede (Holando).

SANĜO DE ADRESO. S-ro Ksaw. Alfus (Krakow, Pedzichow 22) sciligas ĉiujn interesojn pri ŝanĝo de sia adreso; ĝi estas: Ksaw. Alfus, Wied-Bank Zwiazk., Tarnow (Polujo). La ŝanĝo koncernas ankaŭ korespondadon kun „E.E.A.S.“

HUNGARA LITERATURO. Pro malaltigita valuto hungara tre malkara! Esp. libroj el hungara literaturo. Petu proponojn de Hungara Esp. Servo, Paŭlo Balkanyi, Hajos-utca 15-II-2, Budapeŝt VI.

GLUMARKOJ de Postkongreso en Budapeŝt 1921, poŝtkarto-serio havelba ĉe Hungara Esp. Servo. Petu proponojn de Paŭlo Balkanyi, Budapeŝt VI, Hajos-utca 15-II-2.

### DEZIRAS KORESPONDI AŬ INTERŜANĜI:

S-ro Fritz Schlingelhof, Düsseldorf 32 (Germ.), Siemens Str. 45, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, Esp. gazetojn kaj sigelmorkojn, memoraĵojn.

Kiu sendas al mi 50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos ankaŭ 50 poŝtmarkojn de Germanio. Mi tuj respondas. Walter Dick, Plauen i. V. (Germ.), Forststrasse 34.

A. Kurassov, Riesenkaufstr. n-ro 29-1-5, Tallinn (Reval), Estonio, interŝanĝas poŝtmarkojn.

Karlo Paszty, Budapeŝt VII, Erzsébet körút 54, per poŝtk. il. poŝtmarkoj.

Emilo Klammert, Budapeŝt VIII, Prater-u. 46-1-8, per poŝtkartoj, pk. il., poŝtmarkoj, sigelmorkoj, gazetoj kaj leteroj.

Antal Haber (lernanto), Budapeŝt IX, Ernő-u. 12/19, per poŝtk. il.

Kolomano Toth, Budapeŝt IX, Gyep-u. 11-1-19, per poŝtkartoj il. kaj poŝtmarkoj.

Emeriko Strasser, Budapeŝt IX, Remete u. 36-II-8, deziras korespondi per poŝtkartoj il., leteroj, poŝtkartoj, gazetoj nacilingvaj kaj Esperantaj, ŝlosiloj. Tuj respondos.

S-auno Herm. Remers, Düsseldorf (Germ.), Luisenstr. 97, deziras korespondi per leteroj kaj il. poŝtkartoj kun la tuta mondo, ankaŭ ricevi Esp. gazetojn kaj literaturajn.

Dezirantoj korespondadi, interŝanĝi pri Siberio, pri Rusio, pri regado de Koltak kaj aliaj generaloj, povas komenci interkorespondadon kun s-ro B. Najdin, Kuzneĉkaja 65, Omsk, Siberio.

S-ro Paul Müllner, Düsseldorf 45 (Germ.), Fürstenwall 119, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtkartojn, poŝtmarkojn, Esp. gazetojn kaj sigelmorkojn, memoraĵojn.

S-ro Michaelo Zsamboky, Kisepest Beresenyi u. 55, Hung., korespondas kun socialistoj el ĉiuj landoj.

Varsovio, Polio, str. Złota 31, s-ro Konstanty Chmielewski, deziras interŝanĝi kun diversaj esperantistoj tujmوندaj. Kiu sendas al mi diversajn poŝtmarkojn mililajn, ricevos de mi rekompence diversajn uzitajn kartojn ilustritajn.

### Tutmonda Help-Agado por la malsat-suferantaj germanaj infanoj.

Sufiĉe konata fakto estas, ke la granda mizero, kiun la bedaŭrinda milito postlasis al ĉiuj popoloj, speciale ekkaptis milionojn da germanaj infanoj. Nur la riĉuloj povas aĉeti la tro multekostajn vivrimedojn, vestaĵojn, ŝuojn ktp., dum la malriĉaj infanoj senfine malsat-suferadas kaj mortas amase ĉiutage pro manko de necesega nutraĵo, frostas pro manko de karboj, loĝante en obskuraj keloj de la grandurboj. Precipe monrimedoj estas necesaj por helpi dolĝigi la mizeron de la malsategaj infanoj.

La Germana Esp. Komerca Korporacio en Berlin-Steglitz entreprenas tutmondan help-agadon por tiuj ĉi mizeruloj, speciale en esperantistaj rondoj, kaj disponigas al tiu ĉi celo 1000 botelitojn de sia monparfumo „Esperanto“. Po unu botelito estas sendota al bonfaranto, kiu sendos en letero minimume 1 ŝilingon aŭ 2 frankojn aŭ 10 germanajn markojn aŭ pli por monbiletoj aŭ per poŝtĉek-konto Berlin n-ro 104 800, al suba adreso. La kolektiita monsumo estos publikigata en „Berliner Tageblatt“ sub la nomo de la Esp. Komerca Korporacio.

Savu la malsatajn infanojn! Kiu donas tuj, tuj donas duoble! Kiel kvitancon ĉiuj mensendontoj ricevos tuj boteliton de la monparfumo „Esperanto“.

Adresu leterojn al:

Germana Esperanta Komerca Korporacio

J. Schwaiger & K-jo

Berlin-Steglitz (Germ.).

## Anoncoj en ET

costas po kvadrat-centimetro 1 gmk., 0,10 ĥfl., 0,20 fk., 0,20 n. kr., 2 pencoj, 2 hung. kr., 1 ĉ. kr., 3 pol. mk., ktp. Rabato ĝis 40% ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj; krome speciala rabato de 20% por niaj abonantoj.

ANONCETOJ kostas: 2-foja enpresio: 3 gmk., 1/2 ĥfl., 1 fk., 1 ŝil., 6 hung. kr., 3 ĉ. kr., 10 pol. mk. ktp. 3-foja enpresio kostas la duoblon.